



## PILO-PRESS

Internacia  
Informservo

Ĉu vi jam pagis

vian abonkotizon **Eldonanto/Herausgeber:**

1975 por

PILO - PRESS?

Ludwig Pickel  
Postfach 2113  
D-85 Nürnberg 1  
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 7/1975 - 17 feb 1975

Aperas ĉiusemajne

Adiaŭaj vortoj de Ralph Harry

Bonn (pp) Ambasadoro Ralph Harry, kiu forlasis la Federacian Respublikon Germanujo, por estonte reprezenti sian landon ĉe la Unuiĝintaj Nacioj en Novjorko, sendis al la Prezidanto de Germana Esperanto-Asocio, sub la dato de la 6-a de februaro 1975, jenan leteron:

"Kara Prezidanto,

Post kelkaj horoj mia misio kiel Aŭstralia Ambasadoro en Bonno finiĝos kaj mi devos foriri el la Federacia Respubliko.

Mi deziras danki al vi, al via estraro, al Pilo-Press, kaj al ĉiuj membroj de via Asocio, kiuj bonvenigis min kiam mi alvenis kaj tiel varme gastigis min en viaj belaj kaj histori-plenaj urboj.

Per Esperanto mi trovis amikojn ne nur en Bonno, Berlino, en Munkeno, kaj en la aliaj ĉefurboj de la 10 federaciaj ŝtatoj, sed ankaŭ en Eschweiler kaj Hagen, Braunschweig kaj Koblenz, Offenbach kaj Zweibrücken, kaj aliaj urboj.

Mi bedaŭras nur, ke mi ne povis viziti ankaŭ Mainz kaj Mannheim, Bamberg kaj Paderborn kaj la multajn aliajn lokojn el kiuj amikoj sendis salutojn aŭ invitojn.

Kun miaj dankoj mi esprimas ankaŭ la tutkoran esperon, ke la Germana Esperanto-Movado floros en la venontaj jaroj, kaj ke via forto kreskos en samideana unueco.

Sincere Ralph Harry."

\*\*\*\*\*

Granda tago por la Esperantovivo en Paderborn

Paderborn (pp) Kiel Pilo-Press jam informis, la 5 feb 75 estis inaŭgurita la restoracio "Bareto" en Paderborn. La inaŭguran solenaĵon partoprenis pli ol 30 invitoj, i.a. la estro de la esplorcentro, ministeria konsilisto Seelmann, la direktoro de la Paderborna bierfarejo, d-ro Launer, reprezentantoj de la urbo Paderborn, de diversaj firmaoj, de partioj kaj profesoroj de la universitato.

Pri la inaŭguro raportis multaj germanaj gazetoj, kelkaj per ironiaj komentoj; la regiona programo de la Unua Germana Televido faris tre favoran elsendon kun intervjuo kun prof. d-ro Helmar Frank, kaj la Okcidentgermana Radio aranĝis rektan disaŭdigon kaj intervjuis Hermann Behrmann.

Pli ol 120 infanoj el la plej diversaj Esperantoklasoj de Paderborn, Elsen kaj Altenbek kantis la novan Bareto-Kanton. (Vd. p. 2!)



RALPH HARRY


### Paderborna rezolucio

Paderborn (pp) La loka gazeto "Neue Westfälische" de Paderborn publikigis la tekston de rezolucio favore al la instruado de Esperanto apud aliaj lingvoj en lernejoj. La tekston de la rezolucio ni publikigas en la germanlingva eldono de Pilo-Press. Estas interese, ke la unuaj 17 eminentaj subskribintoj de la "Paderborna rezolucio" apartenas al jenaj partioj: 8 al CDU (Kris-tandemokratoj), 6 al F.D.P. (Liberaldemokratoj) kaj 2 al SPD (Socialdemokratoj); 1 subskribinto estas senpartiuulo. La rezolucio estas elmetita en la Esperanto-restoracio "Bareleto" por subskribintoj.


\*\*\*\*\*

### La Bareleto-Kanto


(Das Tönnchen-Lied)



Ba-re-le-to, ka-ra Ba-re-le-to, Ba-re-le-to, ni ŝategas vin!



1. Bo-na es-tas la bi-er', bo-na es-tas la bi-er'



la bi-er', la bi-er', la bi-er', la bi-er', la ... (Refreno)

- |                             |                           |
|-----------------------------|---------------------------|
| 2. Malpleniĝis mia glas'.   | 3. Kelnerino, venu nun!   |
| 4. Novan glason trinkos mi. | 5. Estas bela la estrin'. |
| 6. Gastej-estro gaja ul'.   | 7. Iam do revenos ni.     |
| 8. Glora ĝia estontec'!     |                           |

\*\*\*\*\*

### Esperanto-novajoj el Italio

Bolonjo(pp) Laŭ informoj de Radio Romo de la 26.1.75 la ĉi-jara itala Esperanto-kongreso okazos en Trieste. Por tiu kongreso oni atendas multajn eksterlandajn partoprenantojn, speciale el Jugoslavio kaj Aŭstrio. Temo de la kongreso estos: "Plureco de kulturoj kaj internacia lingvo"; eventualaj subtemoj: "Esperanto kaj minoritataj lingvoj" kaj "Minoritataj lingvoj kaj plurlingvaj landoj." La menciitaj temoj estas aparte aktualaj en la regiono de Trieste, ĉar tie vivas relative alta slovena minoritato, kaj proksime de ĝi troviĝas landoj (kiel Jugoslavio) aŭ landopartoj (kiel la aŭstra Karintio) kun plurlingveco.

La estraro de la Itala Esperanto-Federacio decidis proponi, almenad princope, ke Universala Kongreso de Esperanto okazu en Italio post kelkaj jaroj, inter 1978 kaj 1980.

Koncerne la konatan leĝproponon por la instruado de Esperanto en la mezgradaj lernejoj, oni decidis, ke la speciala komisiono sub direkto de d-ro Mario Dazzini daŭrigu sian agadon.

Esperanto en la radio (pp)

Varsovio. La Esperanto-Ekspreso disaŭdis kelkajn intervjuojn, jam konatajn al regula aŭskultanto: pri la urbo Varsovio kaj ĝia rekonstruo, kun d-ro P. Neergaard kaj d-ro Werner Bormann. Krome oni povis aŭdi koncizajn informojn el la E-movado.

El la leterkesto oni povis konstati, ke ankaŭ la konata brita esperantistino kaj verkistino, Marjorie Boulton, apartenas al la aŭskultantoj de Pola Radio. D-ro Josef Kondor priskribis siajn impresojn pri la germana karnavalo antaŭ sia fenestro en Engers kaj komparis ĝin kun la hungarlandaj vinber-rikoltaj festoj. Li atentigis pri la glumarkoj eldonitaj de li favore al fonduso por lepruloj.

El la Varsoviaj elsendoj oni povis ankaŭ ekscii, ke aperis nova numero de Pola Esperantisto, kun granda malfruigo; aperis numero kun la dato majo-aŭgusto 1974.

La politikaj komentoj substrekis la starpunkton de la orienteŭropa tendaro rilate al la Cipra problemo, la Proksimorienta konflikto kaj la Vienaj interparoloj pri redukto de la armeaj fortoj en meza Eŭropo. Speciale en tiuj tri punktoj de la monda politiko regas principaj diferencoj inter la du grandpotencoj, Usono kaj Sovetunio, sen kiuj solvo de la problemoj ne eblas.

Berno. En siaj elsendoj de la 24/27 feb kaj 3/6 mar 1975 d-ro Arthur Baur traktos lingvan problemon en Svislando tuŝanta ankaŭ la "platdiĉan" lingvon en Nordgermanio. Tiujn du prelegojn iniciatis fakte Germana Esperanto-Revujo, kiu publikigis pasintjare du artikolojn: "La platdiĉoj ne estas aparta etno" kaj "La platdiĉa lingvo estas nura dialekto". Jen ni citas kelkajn frazojn el la disaŭdigota prelego de d-ro Baur: "Kiam en la tempo de Hitler la germanoj tiom akcentis la nocion "etno" kaj diris al ni svisoj, vi apartenas al la germana etno, kaj verdire vi estas germanoj kaj eĉ devus aparteni al la germana regno, tio vekis tre fortan indignon kaj kontraŭstaron en Svislando, kaj ekde tiam la vorto "etno" estas suspektinda kaj ni tute ne volas aŭdi ĝin...."

En siaj antaŭaj prelegoj d-ro A. Baur komentis "svisan" eldonon de revuo "Merian" k.a.

Vieno. En sia semajna komentario de la 8/9 feb 75 d-ro A. Macher okupis sin pri la pozicio de kanceliero Kreisky, ĉu li retiriĝu el siaj oficoj, kaj starigis la komentisto la demandon: "Vere! Kial li cedu el sia ofico? - ĝuante ĝeneralan estimon kaj bonan staton? La pasintan semajnfinojn li pasigis en Pollando por intensivigo de la ekonomia kunlaboro, ĝuste nun li vojaĝas en Norda Afriko, studante la eblojn por solvo de la Proksimorienta Krizo. Intertempe li partoprenis la operejan balon - ankaŭ tio estas io fizike streĉa!..."

La elsendoj de la 15/16 kaj 22/23 feb 1975 en siaj kulturaj partoj okupas sin pri Josef Ressel, la inventinto de la ŝipa helico, kaj pri lia ŝipo "Civetta", kiu ornamas la dorsan flankon de 500-ŝilinga bankbileto, dum la alia flanko montras la portreton de Ressel. Por aŭskultantoj de la Vienaj elsendoj, kiuj vane atendis la 1/2 feb la Esperanto-voĉon el Vieno, jen la klarigo - surpriza - por la silentado: "La 1an kaj 2an de februaro okazis surpriza ĝeno, absolute neatendita, neatendebla. La jam bonorde preparolita sonbendo malaperis mistere; la teknikistoj ne povis ĝin trovi, kiam estis veninta la horo de la disaŭdigo."

\*\*\*\*\*

Mendu la glumarkojn pri la Germana Esperanto-Kongreso en Oberkirch kaj "Helpu al la lepruloj!"

# Ein dreijähriger Knirps antwortete in Deutsch, Japanisch und Esperanto

## Das war die besondere Attraktion einer Veranstaltung der Esperantogruppen Nürnberg und Fürth

**Kronach / Fürth / Nürnberg (wk)** - Ein dreijähriger Knirps, der den entzückten Besuchern spontan in drei Sprachen antwortete, dem Deutsch und Japanisch ebenso geläufig sind wie die internationale Sprache Esperanto, war die besondere Attraktion einer gemeinsamen Veranstaltung der Esperantogruppen Nürnberg und Fürth.

Neben anderen nordbayerischen Esperantisten waren auch Vertreter der Kronacher Gruppe einer Einladung in das Dr.-Martin-Luther-Heim in Fürth gefolgt, um sich von dem jungen Fürther Computerspezialisten Michael Zeilinger, der mit einer Japanerin verheiratet ist, über die für Europäer immer wieder faszinierende fernöstliche Inselwelt und die Lebensgewohnheiten ihrer Bewohner in einem ausgezeichneten, auf Esperanto gehaltenen Vortrag unterrichten zu lassen, der durch prächtige Colordias ergänzt wurde.

Voller Stolz zeigte danach die japanische Mutter ihren Sprößling und überließ

ihn gerne den fragenden Gästen, die seine Sprachkenntnisse in kindgemäßen Gesprächen heimlich prüften. Und wirklich: Der Kleine antwortete, ohne eine Sekunde zu überlegen, auf Fragen in drei Sprachen, was seinen Vater zu der Bemerkung veranlaßte, Esperanto, das er bereits als Gymnasiast erlernt und in Auslandskorrespondenz erprobt hatte, habe ihn mit seiner Frau zusammengeführt.

Übrigens ist Esperanto, wie in Kreisen von Sachkennern bekannt ist, schon häufig Ehevermittler gewesen, seine Hauptaufgabe freilich liegt in der Vermittlung fremder Kulturen, in der Schaffung Sprachengrenzen überschreitender Kontakte, in der Erschließung weltweiter Informationen. Wenn man aber — wie Michael Zeilinger aus Fürth — sozusagen als Dreingabe zu einer Sprache noch eine charmante Frau gewinnen konnte, dann erst ist das „Sprachenglück“ vollkommen.

Im weiteren Verlauf berichtete nach der Begrüßung durch Pfarrer Wilhelm Grillenberger, der den Gästen „multan pllezuron por la prelego“ (viel Vergnügen für den Vortrag) wünschte, der Nürnberger Esperanto-Verleger Ludwig Pickel über die allbekanntesten, aber „taktvoll“ übergangenen Sprachschwierigkeiten bei Städtepartnerschaften. Er bezog sich dabei auf die Partnerschaftsfelder zwischen Forchheim und dem französischen Le Perreux. Pickel bezweifelte, ob langdauernde Kontakte zwischen Bürgern beider Städte

ohne sprachliche Basis überhaupt denkbar seien.

Wie er mitteilte, hätten Esperantisten in Forchheims Partnerstadt die Initiative ergriffen. Der 2. Bürgermeister von Le Perreux habe sich entschlossen, als erster Esperanto zu lernen. Nunmehr solle auch in Forchheim das Esperantostudium in Angriff genommen werden, wozu die Nürnberger Gruppe erste Hilfestellung geben wolle. Mit Lächeln, Händeschütteln, Dolmetschen, gemeinsamen Liedern, Volkstänzen und dem Austausch von Dokumenten und Geschenken lasse sich keine Freundschaft besiegeln. Wesentliche Voraussetzung sei der persönliche Kontakt zwischen den Menschen, und dazu bedürfe es einer gemeinsamen, leicht erlernbaren Sprache. Ohne sie gerieten alle Freundschaftsbeteuerungen alsbald in Vergessenheit, und man bleibe sich nach wie vor fremd.

Nach der Veranstaltung begaben sich noch viele Teilnehmer in das Restaurant „Schwarzes Kreuz“, wo sie sich in Esperanto aufs angeregteste unterhielten. Der Senior der Nürnberger Gruppe, Schauspieler und Rezitator Alexander Starke, der des öfteren auch an der Kronacher Volkshochschule mit seinen humoristischen Vortragstrüben „Das Lachen der Welt“ aufgetreten ist, rezitierte lyrische Gedichte und las erheiternde Anekdoten aus seinem in vielen Ländern dargebotenen Esperanto-Repertoire „La rido de la mondo“.



Das Bild zeigt von links Ludwig Robel, Pfarrer Wilhelm Grillenberger, das Ehepaar Zeilinger mit Sohn und José Guñat (aus Barcelona), Mitglied der Kronacher Esperantogruppe (wohnhaft in Unterrodach). Foto: Walter F. J. Walther

**Kronach (pp)** La lokaj gazetoj regule raportas pri Esperanto. La 18an de februaro 1975 "Neue Presse" publikigis raporton pri la Esperanto-kunveno en Fürth-Nürnberg kun prelego de Michael Zeilinger pri Japanio. Pilo-Press jam raportis pri tio. La E-traduko de la artikola titolo estas "Trijara uleto respondis en germana, japana kaj Esperanto".

La apuda foto montras: (de maldekstre: Ludwig Robel, Kronach; pastoro Grillenberger, Fürth; la geedza paro Zeilinger kun filo; José Gunat el Barcelono.

\*\*\*\*\*

Pilo-Press, Internacia Informservo

Jara abonkotizo 30,- GM pagebla al Ludwig Pickel  
85 Nürnberg 1, Postfach 2113, PSchK Nürnberg  
819 56-851, Stadtparkasse Nürnberg 1.901.579